§ Jura Semajno

Semajna bulteno de Internacia Jurista Esperanto-Asocio

Novembro : 1 2021

# EŬROP-UNIA KORTUMO NULIGAS TRAKTATON KUN MAROKO

La Kortumo de Eŭropa Unio nuligis, la pasintan 29-an de septembro, traktaton inter Eŭropa Unio kaj Maroko rilate fiŝkaptadon, pro la fakto, ke la traktato entenas la teritorion de Okcidenta Saharo, kiu ankoraŭ ne estas malkoloniigita laŭ Unuiĝintaj Nacioj. Same, oni nuligis impostajn avantaĝojn en Eŭropo al produktoj ellaboritaj en tiu antikva hispana kolonio.




La juĝo de la Eŭrop-Unia Kortumo en Luksemburgo pravigas du apelaciojn prezentitajn de la *Fronto Polisario*, organizo kiu reprezentas la saharan popolon kaj luktas favore la sendependon de la teritorio. Tamen, la juĝo akceptas la efektivigon de tiuj traktatoj ankoraŭ dum du pliaj monatoj, cele la certigon de internaciaj kompromisoj adoptitaj de Eŭropa Unio. Eĉ oni povos plilongigi tiun dumonatan lim-tempon se kelka partio prezentas apelacion kontraŭ la juĝo.

La argumentoj proponitaj de la Konsilo de la Eŭropa Unio estas rifuzitaj de la Kortumo. Unualoke, oni akceptas la rajton de la *Fronto Polisario* apelacii kontraŭ akordo subskribita de Maroko kaj Eŭropa Unio. Tiel, la juĝo proklamas, ke tiuj traktatoj havas certajn krom-efikojn rilate la teritorion de Okcidenta Saharo kaj pro tio la *Fronto Polisario,* kiel reprezentanto de tiu popolo, rajtas opozicii al traktatoj subskribitaj rilate la teritorion.

La juĝo akceptas, ke Eŭropa Unio kaj Maroko rajtas subksribi tiujn akordojn, tamen la Kortumo deklaris, ke estus necese havi la akcepton de la popolo de la teritorio por efektivigi ilin. La nuligo de tiu traktato inter Bruselo kaj Rabato damaĝas ĉefe centon da hispanaj fiŝkapt-ŝipoj, kiuj rajtis labori en la maro apud la antikva hispana kolonio.

La juĝo estas granda sukceso por la *Fronto Polisario*, pro la fakto, ke oni agnoskas la rajton de la sahara popolo esti konsultata, se oni deziras efektivigi internacian traktaton kiu povas tuŝi la naturajn resursojn de la teritorio. Do, ne sufiĉus la akcepto nur de la nuntempa administranto de la teritorio, t.e. la Maroka Regnolando.



En la jaro 1975 Hispanio subskribis traktaton kun Maroko kaj Maŭritanio, pere de kiu Hispanio cedis la administradon de la sahara kolonio al tiuj du afrikaj landoj. Post akordo inter la *Fronto Polisario* kaj Maŭritanio en la jaro 1979, ĉi tiu lando forlasis la sudan regionon de Okcidenta Saharo, kiu tuj estis okupata de Maroko.

# *Vorto de la Semajno*

## Abandono (laŭ PIV)

Ago, per kiu oni cedas al la asekuristo la asekuritan objekton aŭ tion, kio restas el ĝi post difektiĝo, kaj anstataŭe postulas la plenan asekurintan sumon.

## Abandoni

Cedi per abandono.



Difektita asekuraĵo

Asekur-kompanio

Mono paktita kiel kompenso



Asekurato

*Post la akcidento la propietulo de la difektiva aŭtomobilo abandonas ĝin, kompense li ricevas la paktitan monon de la asekuristo. La asekuristo fariĝas propietulo de la aŭtomobilo.*

§

***Ĉu vi deziras aperigi ĉi tie reklamon pri via firmao aŭ pri viaj servoj kiel juristo?***

Membroj de la Internacia Jurista Esperanto-Asocio rajtas aperigi reklamon senpage en ĉi tiu jura bulteno. Kontaktu kun ni !

*Jura Semajno* estas bulteno eldonita kaj dissendita de Internacia Jurista Esperanto-Asocio.
Se Vi ne deziras ricevi ĝin, avertu pri tio al la redakcio: jurista@esperanto.ac
DANKON !